# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA 3-a numero julio-septembro 1971

## EN LA LANDO DE LA 56-a UK

La metropolo de Britio akceptis komence de aŭgusto pli ol du mil entuziasmajn adeptojn de la Zamenhofa ideo, kiuj manifestis efektivan internacian amikecon kaj interkompreniĝon, uzante nur la internacian lingvon Esperanto! Malfacile estas priskribi per kelkaj vortoj la etoson kaj medion de la renkontiĝoj, kunsidoj kaj diversaj aranĝoj. Ampleksa estas Londono kaj ampleksaj estas ankaŭ ĝiaj programoj de la kongreso – ĉu la solena inaŭguro en la impona halo de Royal Festival Hall, ĉiutagaj prelegoj, labor-kunsidoj, amuzvesperoj en University College, tuttaga ekskurso al Windsor-kastelo aŭ (iom melankolia) solena fermo de la kongreso en Friends House.

Tamen ne finiĝis nove ligitaj amikecoj kaj renkontiĝoj kun geamikoj. Dank' al iliaj invitoj kaj senlima oferemo mi povis admiri la centjaran Worcester-Katedralon, la urbon, kie ravis min tipaj ĉarmaj dometoj kun belegaj ĝardenetoj. Sekvis seshora trajnveturado tra la industria centro Birmingham, tra la urboj York, Newcastle upon Tyne kaj preter la marbordo al Berwick upon Twee ĝis Edinburgh, la urbo, kiu gastigis la TEJO-kongreson. Tute erariga estas onidiro pri la t. n. "skota avaremo" – mi ja ĝuis tiom da gastemo! Oni zorgis pri mi kun preskaŭ patrina afablo kaj varma amikeco, kiuj malgraŭ malvarma ĉemara vetero plenigis mian koron kaj pensojn per neforgeseblaj travivaĵoj. . . Majeste vidiĝas super la urbo Edinburgh Castle ka j nekutimaj estas por niaj okuloj skotaj uniformoj kaj kostumo de la sakfajfisto. La historio spiras en la stratoj kaj stratetoj. La nova impona ponto ligas la bordojn de la markolo inter la suda kaj norda Skotlando kiel simbolo inter la historie kaj la nuntempo.

Finiĝis la tempo de mia restado kaj jam atendis min la kanalo La Manche kaj maltrankvila maro. Kontraste efikis la regiono de Nederlando. Trankvilo kaj la suna brilo, tipaj kanaloj, muelejoj kaj ankaŭ kvalitaj ŝoseoj, agrablaj homoj – vere neforgesebla lando. Kaj kion rakonti pri Parizo? Mona Lisa kaj Louvre, la rivero Seine, la Eifela turo ne bezonas komenton. Ankoraŭ rapida reveno tra Germanio kaj mi atingas mian patrujon, mi aŭdas la melodian ĉeĥan lingvon – mi estas hejme!

L. Klegová

## Z činnosti klubu

Pravidelné schůzky navštěvuje v průměru 70 členů, kteří se aktivně účastní i programové části. Návštěvníci se zájmem akceptují pořady, které zvyšují jejich jazykovou a kulturní úroveň; vítány jsou rovněz přednášky zahraničních esperantistů.

Naši členové se zúčastnili v letošním létě setkání v Poděbradech, Pardubicích a Jablonci. Klub podnikne autobusový zájezd na setkání českých a slovenských esperantistů do Vsetína, přihlásí-li se dostatečný počět zájemců. Připravuje se i hromadný zájezd na tradiční setkání do Mělníka.

Naše mládež připravuje na 5. října večírek, na který srdečně zve všechny, i dříve narozené. Letos se obnoví také tradice mikulášských večírků. Nezapomeňte si poznamenat v kalendáři datum 7. 12. Příspěvky do programu jsou vítány.

Krom obvyklého kursu pro začátečníky, vedeného A. Slaninou, uspořádá klub specielní kurs pro pokročilé, hlavně absolventy elementárního kursu, kteří si často stěžují, že nemají možnost zdokonalovat se. Tento kurs se bude konat v některé z klubovních místností každé úterý mezi 18-19. hod. pod vedením ing. Felixe. Přihlášky zasílejte na adresu: EK Praha, p. schr. 1069, Praha 1.

Členům klubu, kteří dosud z různých příčin nemohli uhradit Členský příspěvek ČES, doporučujeme, aby doplatili 10 Kčs a stali se tak přispívajícími členy bez odběru časopisu Starto.

Mesaĝo de la prezidanto

Kiel píezidanto de la Esperantista Klubo en Praha mi salutas niajn membrojn kaj mi tre ĝojas, ke nia membraro kreskas.

La venontan jaron nia klubo festos la 70jaran jubileon de sia ekzistado. Mi esprimas sinceran dankon al ĉiuj, kiuj jam nun preparas la programon por la jubileaj tagoj kaj mi petas ĉiujn membrojn, ke ili plialtigu sian aktivecon. Vizitadu regule la kunvenojn kaj akiru novajn membrojn! Nun, en la monato septembro ni aranĝos novan kurson por komencantoj kaj progresintoj. P r o p a g a n d u  i l i n ! Faru kio estas ebla por disvastigi Esperanton inter la junularo!

KE KRESKU KAJ PROSPERU EN LA JUBILEA JARO NIA KLUBO!

Prof. D-ro Rudolf Horský

---

POŜATLASO DE LA MONDO en Esperanto ĵus aperis en Kartografia eldonejo en Prago. Mendu ĉe Kniha n. p. La amasmendojn aranĝos Ĉ E A.

DU GRAMOFONDISKOJ eldonitaj de Balkanton, Sofia (kantas Miŝo Zdravev) haveblaj ĉe ĈEA. La prezo por unu peco 20 Kčs.

---

La kluba biblioteko (Týnská stř. 3) kaj la bibliotekisto A. Zmeškal estas je dispono al la legantoj ĉiumerkrede inter la 18a ĝis la 20a horo kaj ĉiusabate inter 9-11a horo.

Rememoroj aĝaj kvindek jarojn

La XIII-a UK en Praha ankoraŭ longe okupos la kapon kaj plumon de la partoprenintoj. Unu el ili, s-ino Sklenčková el Prago, priskribis por ni humuran okazintaĵon de la interkona vespero:

Dum tiu vespero mia edzo kaj mi, por faciligi al samideanoj nin serĉantaj la trovon, portis sur la vestaĵo slipon kun nia nomo kaj loĝloko: Hradec Králové. Promenante ni renkontis belulon kun riĉa barbo. Deĉifrinte la surskribon li alparolis min kun franca akcento: "Ĉu vi konas en Radekkralove fraŭlinon Manka Dolanská?". "Certe", mi diris, "ŝi ja estas mia fratino". Ni do kune serĉis ŝin kaj dume ni eksciis, ke li estas franca kuracisto d-ro Domec, kiu laboras en Hindoĉinujo. Ni sciis, ke li kun mia fratino fervore korespondas kaj ke ŝi lin sciavide atendas. Baldaŭ ili jam sidis kune kaj vigle interparolis. Mi vidis en la vizaĝo de mia fratino seniluziiĝon eĉ konsternon. Evidente li ne plaĉis al ŝi, eble pro la tro riĉa barbo kaj senhara kapo. Post iom da tempo, pardonpetinte ŝi forlasis nin. La kuracisto estis tre klera homo, tre interese li rakontis pri siaj vivo kaj laboro en Vjetnamio, pri la inteligenta popolo, menciis la koloniisman politikon de la franca registaro tie. Li poste fariĝis nia bona amiko kaj ĉiam, kiam li ĉiun trian jaron libertempis sur sia bieno en Francio, venadis al ĈSR kaj restadis ĉe ni ĉiam la tutan monaton.

Dum ni babilis kun la doktoro, mia fratino ĉasis por sia memorlibro aŭtogramojn de eksterlandaj esperantistoj. Ni trovis ŝin en la societo de iu bela svelta hispano – kiel ŝi kredis laŭ lia vizaĝo. Sed kiam li enskribis sian nomon en la memorlibron, ŝi konsterniĝis. Li ne estis hispano, sed – ĉeĥo! Kaj lia nomo estis Ota Ginz. Sed tiu Ota Ginz el Praha estis pli persistema ol la franca kuracisto kaj post iom da tempo mia fratino fariĝis lia edzino. Da tiaj fatalaj okazintaĵoj, ĉu feliĉaj aŭ malfeliĉaj, kaŭzis la esperantistaj kongresoj sufiĉe multe.

---

VENONTJARE PLENUMIĜOS 70 JAROJ de la Esperantista Klubo en Praha. Ĉiuj esperantistoj de la ĉefurbo devus kontribui al tiu grava jubileo. Jam nun oni povas helpi sendante al EK dokumentojn (librojn, gazetojn, artikolojn, korespondencon ktp.) pri la fondiĝo kaj historio de la klubo.

---

Grava atentigo! La preparkomitato de la Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Vsetín anoncas, ke aliĝis jam 200 samideanoj inkluzive de eksterlandaj gastoj. Plene okupitaj estas oratora kaj recita konkursoj. Oni prizorgis standon por librovendado kaj krome aranĝos libro-loterion. Pluajn interesatojn pri la renkontiĝo ni atentigas, ke sufiĉas aliĝi perletere!

---

BULTENO de Esperantista Klubo en Praha, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas kvarfoje jare. Redakta komitato: inĝ. Eduard Felix, Oldřich Kníchal (redaktoro) kaj Jaroslav Mařík. Adreso EK Praha, poŝtkesto 1069, Praha 1 , ĈSR.

## TRA BALKANO KUN VERDA STELO

La 2an de julio forveturis el Prago konforta aŭtobuso kun grupo de esperantistoj kaj turistoj. Ĝi estis ornamita fronte per E-flago kaj ceteraj tri flankoj per bone videblaj. Verdaj steloj sur blanka fono, supre trimetra blanka strio el tolo kun verda teksto anoncis la devizon de la entrepreno: "Per Esperanto tra Balkano".

La reklamo parolis elokvente al ĉiu observanto, ke 40 homoj intencas viziti Hungarion, Rumanion kaj Bulgarion. Tamen la nekonatoj de nia afero apenaŭ povis supozi, ke nin atendas kun ĝojo geamikoj, kun kiuj ni povos facile paroli pri io ajn kaj kiuj montros al ni belecon de siaj landoj, rakontos pri ties kutimoj kaj historio. Ili ne sciis, ke ni vespere renkontiĝos en klubejoj por komuna programo kaj ni sentos nin kiel en "unu granda rondo familia".

Ĉio ĉi efektiviĝis kaj ni povas nun post la sukcesa ekskurso diri al ĉiu turisto, ke vere valoras lerni la internacian lingvon Esperanto! La rezulto de la komuna entrepreno superis nian konjekton.

Antaŭ ĉiu loko vizitota ni estis informitaj pri la lokaj specialaĵoj kaj pri nia eventuala renkontiĝo kaj speco de tranokto. Estis inter ni kunvojaĝantoj, kiuj scipovis amuzi nin per diversaj programeroj. Krome ni posedis speciale kompostitan kantareton kun kantoj verkitaj en Esperanto kaj serion da naciaj kantoj ĉeĥaj kaj slovakaj.

Kelkloke ni spertis agrablan surprizon, ekzemple en la urbo Pazarĝik, kie oni pridonacis nin per du grandaj kestoj da kukumoj kaj tomatoj unuakvalitaj; en Burgas venis nin akcepti esperantistoj kun verda standardo ora brodita kaj invitis nin al la urba konsilantaro, kie ĉe granda tablo ni akceptis donacetojn kaj refreŝiĝon. Aŭ hazarde nin vidantaj gesamideanoj rapide postsekvis nin por renkontiĝi kun ni. Aliloke oni longe atendis nin, kvankam ni pro certa kaŭzo malfruiĝis. En Bansko ni ricevis abrikotojn, bukedon da lilioj kaj belan libron pri la montaro Pirin.

Ĉu la rememoroj el Sofio, Veliko Tarnovo, Stara Zagora, Sozopol, la monto Šipka, Kazanlyk, Sliven, Balĉik, Albena, Razgrad, la monaĥejoj Panonhalma, Rilski Monastir, La ŝtona arbaro, Tihány, Siofok, Kecskemet, Gyula, Bukuresto, Turnu, Severin, Beleš, Sinaj, Braŝov, Gluj kaj altaj montoj kaj restado ĉe la maro kaj la nokta ekskurso dum Neptun-solenaĵo ne rakontos al vi pri la ĝuo? Ĉu vi povus forgesi la solenaĵon en ortodoksa preĝejo kun oraj kupoloj apud Šipka? Ĉio ĉi estas por ni tre valora kaj ni en niaj pensoj dankas al ĉiuj, kiuj helpis al ni tion vidi.

Ni pensas ankaŭ pri nia lasta stacio en Budapeŝto, kie ni denove spertis afablecon de la tieaj samideanoj kaj dank' al ili ne sentis nin en tia urbego tuto fremdaj.

Mi esperas, ke nia laboro rilate al eksterlanda turismo progresos kaj ni ĉiuj devas kunlabori. Se tamen io al iu ne plaĉis kaj se li sentas sin kapabla fari ĝin pli perfekte, li anoncu sin kaj diru sian opinion kaj sugeston. La malfacilaĵoj nin ne timigu, sed helpu al ni esti pli perfektaj!

Ladislav K y n č l

Vizitoj el eksterlando

Dum la lasta tempo vizitis EK en Praha i. a. d-ro Toru Mori kuracisto el Japanio, s-ro Zalmanoviĉ, membro de Kunordiga E-komitato por Rumanio, d-ro Yvette Vierne, laboratoriestrino de la medicína fakultato en la franca urbo Montpellier. S-inoj Maria Hansen kun sia amikino Lilii. Ge-roj Jim kaj Jennifer DIMO.

Falintaj folioj

Falintaj folioj plenigas la vojon
en koron senvole penetras malĝojo:
alvenis aŭtuno.... Finiĝis somero ...
Susuras folioj ... dum vivo-vespero . .

Laŭ vojoj konataj de granda urboparko
solece ni paŝas. Orflava la arko
sin sternas belete jen super la kapo
senbride ventblovo forŝiras la ĉapon.

Ho, for la malĝojo, malgajaj pensetoj,
forlasu min plene, forflugu asketoj!
Vi, vento, jen ŝiru la harojn taŭzitajn,
kunprenu malĝojon kaj pensojn hezitajn.

Benita Kärt, Tallin, Estonio

o-o-o-C-o-o-o

Persone

Omaĝe al d-r o S. Kamarýt. La 30-an de julio 1971 pasis 15 jaroj de la morto de dro Stanislav Kamarýt, la meritplena pioniro de la Esperanto-movado en niaj landoj. Por omaĝi la dat-revenon de lia forpaso kolektiĝis ĉe lia tombo en Holešovice kelkaj membroj de EK Praha. Post mallonga alparolo de la prezidanto prof. d-ro R. Horský s-ino Sklenčková metis sur la tombon en la nomo de EK bukedon da freŝaj floroj.

La 3-an de aŭgusto parolis dum kluba kunveno pli detale pri la vivo de S. Kamarýt s-ro Bartošík, kiu akcentis precipe liajn meritojn sur la kampoj literatura kaj propaganda.

------------------------

La 8-an de septembro pasos jam 2 jaroj de la morto de nia neforgesebla pioniro, honora prezidanto de EK Praha Jaroslav Šustr.

-------------------------

Antonie Vojtová, vidvino de la nacia artisto J. Vojta, membrino de EK Praha kaj ĈEA, mortis en Modřany. 29. 7. 1971 en la aĝo de 74 jaroj.

---------------------

2.10. fariĝos 65-jara nia membro d-ro Tornáš Pumpr, akademiano.

-------------------------

František IIja Severa (nask. 1894) forpasis en Suchdol la 20-an de julio. Membro de EK Praha kaj ĈEA. Honoron al lia memoro!

------------------------

Ing. Ladislav Daniel esperantisto de post 1912, eksdelegito de UEA por Poděbrady, atingis la 27-an de junio 75 jarojn.

--------------------

La 9-an de julio edziĝis sekretario de ĈEA Pavel Polnický.

-------------------------

Al Drahomíra Zdvihalová naskiĝis la 29-an de junio filineto R e g i n a .

## P R O G R A M O J  D E  L A  K L U B A J  V E S P E R O J

/septembro – decembro/

| | | |
|---|---|---|
| | | 27a Datreveno de Slovaka Nacia Revolucio |
| 7. 9. | J. Vítek - L. Klegová | La 56-a UK en Londono |
| 14.9. | T r i o p o | Petr B e z r u č |
| 21.9. | Nederlandaj fervojistoj | Interesaĵoj pri Amsterdam |
| 28. 9. | | Vespero omaĝe al Pumpr kaj Kořínek |
| 5.10. | J u n u l a r a  v e s p e r o | |
| 12.10. | A. Musilová | Feriado en Pollando |
| 19.10. | Kynčl-Vyhlas-Horský | Ekskurso al Bulgario (kun lumbildoj) |
| 26.10. | M. Hankeová | B. Němcová en Sliač (kun lumbildoj) |
| 2.11. | G r a n d a  O k t o b r a  R e v o l u c i o | |
| | A . Bartošík | Kulturaj rilatoj inter Ĉeĥoslovakio kaj Nederlando – I-a parto |
| 9.11. | L. Kynčl-Vyhlas-Šperling | Filmo "Per Esperanto tra Balkano" |
| 16.11. | B. Dryák | Lumbildoj |
| 23.11. | Kynčl-Vyhlas-Horský | Lumbildoj el Kaŭkazo |
| 30. 11. | J. Bendová | El leteroj de astronomo H u j e r |
| 7.12. | D-ro Novobilský – M. Smyčka: | Nikolaa vespero |
| 14.12. | D-ro R. Horský | Zamenhofa vespero |
| 21.12. | D-ro Horský | Kristnaska vespero |
| 28.12. | S i l v e s t r a  p r o g r a m o | |

-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------

K o r e k t o

Ni petas legantojn de la Bulteno, ke ili bv. korekti la eraron en la lasta n-ro en la artikolo de J. Drlík (la 2-a paĝo, 9-a linio), kie anstataŭ "realigi socialismon" devis esti "realigi sociajn ŝanĝojn".

-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Pokladní zpráva ku dni 13.8.1971

| | |
|---|---|
| Pokladna . . . . . . . . . . . . . . | 630,95 |
| Státní spořitelna . . . . . . . . | 3937.90 |
| C e l k e m | 4568, 85 |

Vysílání o esperantu

Ostravský rozhlas vysílal 4. září v relaci "Radiopasáž" rozhovor s Drahomírem Kočvarou, místopředsedou ČES, o esperantském hnutí.

-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------

LA VEGETAĴOJ NIN SENTSEKVAS

Arboj, floroj kaj kreskaĵoj ĝenerale estas senfine pli komplikaj ol ni kredas. Sciencistoj tutnonde ĉiam pli komencas interesiĝi pri la misteroj de l'naturo ligiĝantaj kun la vegetaĵoj.

Opinio pri kreskaĵoj ne plu povas esti tia, kian oni alkutimiĝis. Esploroj, kiujn faras fakuloj, vidigas la mondon de l'kreskaĵoj en nova vidaspekto. Sovetiaj kaj usonaj scienculoj, sendepende unuj de la aliaj, alvenis al la konkludo: La vegetaĵoj atent- kaj sent- sekvas nin!

Elstara usona fakulo pri detektoroj de mensogado Clive Baxter ekinteresiĝis pri la vegetaĵoj en la jaro 1966. Dum akvumado de floroj en lia kancelario encerbiĝis al li jena ideo: post kiu tempo atingos la akvo la plejsupron de la kreskaĵo? Li ekpensis, ke li povus mezuri galvanan reakcion de la kreskaĵo kaj tiel ankaŭ ritmon de akvoascendo per la detektoro. Li do lokigis sur folion de la planto la detektorajn elektrodojn sammaniere kiel oni uzas ilin ĉe la esplorado de la homo.

G. Baxter konstatis surprizigan aferon: Mi supozis, ke per konekto de l'cirkvito mi povos mezuri ascendrapidecon de la humidaĵo en la kreskaĵo. Sed registraĵo gajnita post proksimune unu minuto similis tiun, kiu estiĝas ĉe la homo dum okazado de emociaj reakcioj . . . Mi komencis demandi min, ĉu inter registraĵoj far de la kreskaĵo kaj de homo povus ekzisti ia ligiteco."

Plejmulto de la homoj ĝis nun opiniis, ke nur la homo kaj la pli superaj bestoj estas kapablaj pri tio, kion oni nomas "emociaj reagoj". Tamen post intervalo de aŭ minutoj", diras plue Baxter, "mi decidiĝis, ke mi provos albruligi la folion per alumeto. Tujsekve aperis profunda oscilado de l'registraĵo. Kaj krome en tiu momento mi ankoraŭ tute ne tuŝis la folion per la fajreto. La registraĵo ŝanĝiĝis jam pro la ekpenso je l'doloro, kiun mi estis kaŭzonta al la planteto. Ŝajnas, ke tio anoncas ekziston de formo de iaspeca "komprenperceptado" de kreskaĵoj. Baxter putilikigis en 1969 studon titolitan "Ekzisto de primara, kompren-perceptado en la vivo de l' kreskaĵoj", kiu ankaŭ en la scienca mondo elvokis grandan eĥon kaj sensacion.

Unu el laborantoj de la eksperimentejo de Agronomia Akademio en Moskvo proklamis en la ĵurnalo Pravda, ke la "nervosistemo" de l' kreskaĵoj, kvankam multe pli primitiva ol la homa, funkcias egalmanierr kiel tiu de la homo. Oni plenumis centojn da eksperimentoj, kiuj lastfine gvidis al konkludo, ke la kreskaĵoj disponas pri nervosisterno, kvankam primitiva, sed ebliganta al ili elspuri, kio okazas en ilia ĉirkaŭ-medio kaj kio koncernas ilin mem.

Jam tio estas surpriza, ke la kreskaĵoj povas esti konsciaj pri tio, kio ĉirkaŭas ilin kaj ili scipovas defendi sin kontraŭ subitaj veterŝanĝoj. Ili ricevas signalojn, kiuj trairas kanalojn ĝis la centro, kie la informo estas analizata. En la moskva laboratorio oni opinias, ke tiu ĉi centro troviĝas en kolparto de la radiketoj.

Preskaŭ nekredebla ŝajnas esti la aserto de Baxter, ke la kreskaĵoj reagas ne nur je la danĝero kontraŭ ilin mem, sed ankaŭ je emociaj krizoj venantaj de aliaj vivoformoj, do de animaloj. Por pruvi tiun ĉi hipotezon Baxter mortigis du markankretojn, ĵetinte ilin en bolantan akvon. Li registris nekredeblan rezultaton: ĉiufoje, kiam kankreto vidiĝis en la bolanta akvo, travivadis la kreskaĵoj egan "emociplenan reagadon".

Plua el la eksperimentoj, plurfoje ripetata, konsistis el tio, ke en la laborejon envenadis sinsekve ses personoj. Unu el la seso intence pereigis unu el la ĉambrofloroj. Sur unu el la restintaj flproj Baxter fiksis la detektoron kaj denove enirigadis la grupon. Tuj post enpaŝo de la "murdisto" la esplorata kreskaĵo "eksentis" lin kaj montris potencan emocistaton.

"Ĝi estas fascinanta mondo, kiun ni ĝis nun ne konas bone, necesas plue ĝin studi.... ", diras Baxter. Sen terminoj de l'scienco ni povas diri: "Homoj, kondutu dece, la kreskaĵoj observas vin!!"

El "Svobodné slovo" tradukis d-ro J. Černý.